Karaj,

Bv. helpi diskonigi la anoncon de la 6-a Kongreso de KEA.
Vi multe povas helpi se vi resendas tiun ĉi retmesaĝon al viaj kontaktoj en la tuta mondo.

Amike,

Calienes

Estimataj gekolegoj!

La Estraro de Kuba Esperanto-Asocio anoncas la okazigon de la

6-a Kongreso de KEA
18-22 novembro 2015
Havano, Kubo

Kongresa temo: Lingvoj kaj kulturoj: identeco en diverseco.

Ni planas la partoprenon de 150 aktivaj kubaj geesperantistoj en reprezento de ĉiuj filioj kaj grupoj de KEA, kaj kompreneble, ni tre esperas
pri la partopreno de eksterlandaj gesamideanoj, sen kiuj la kongreso ne spertos tiun
apartan kaj unikan guston de internacieco.

La kongresejo estos la sidejo de la Unuiĝo de Arkitektoj kaj Konstruinĝenieroj de Kubo,
organizaĵo kun kiu KEA de kelkaj jaroj tenas kunlaborajn rilatojn, situanta
en la moderna parto de Havano, tre facile atingebla el la tuta urbo.

Ni tre dankas la helpon por diskonigi tiun ĉi alvokon kaj plaĉe restas je dispono por respondi al demandoj de interesitoj.

Jen ligilo al la Kongresa Bulteno:
https://dl.dropboxusercontent.com/u/1107821/6kongreso_kea_kongresa_bulteno.pdf

Laŭpete ni tre volonte sendos ĝisdatigon de la kongresaj preparlaboroj kaj programo.

A
mikan saluton en la 47-a Semajno de Internacia Amikeco!

Alberto F. Calienes

esperanto CUBA

Alberto F. Calienes
Prezidanto
Kuba Esperanto-Asocio
Apartado 5120, CU-10500 La Habana, Cuba
+53 7 640 4484 (oficejo)
+53 5 292 0239 (poŝtelefono)
+53 7 794 4175 (private)
kubesp@enet.cu
www.esperanto.cult.cu

Amikeco trans limoj